**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

N-ro 12/78 - 22 mar 1978

Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Esperanto en Radio

Pri la elsendoj de Radio Vatikana, Romo, Svisa Kurtonda Radio k.a. ni komentos en la venonta numero. Bedaŭrinde ĉiam mankas spaco! Ankaŭ en Esperantujo regas inundo da informoj!

## Korajn salutojn de - Wim Thoelke

Wiesbaden-Luksemburgo (pp) - Kiel multaj esperantistoj scias, la ŝatata germana televidisto kaj kvizestro Wim Thoelke legis dum elsendo Esperante als Struvelpetro kaj parolis pri la Internacia Lingvo (Der Grosse Preis, Pilo-Press raportis siatempe pri tio!)

Triksini dankis al li pri tio kaj ricevis nun leteron kaj foton. La germanlingva letero de la 8-a de marto komenciĝas per la Esperantlingva alparolo "Estimata sinjoro Pastro" kaj finiĝas en Esperanto per la frazo "Kun multaj afablaj salutoj, via Wim Thoelke". Ankaŭ la foto de Wim Thoelke portas dediĉon en Esperanto: Korajn salutojn Wim Toelke.

## Pliaj novaĵoj el la Esperanto-Centro Luksemburgo

Luksemburgo (pp) - La Ministerio por Turismo en Luksemburgo permesis sinkronizi Esperante belan koloran filmon pri la Grandduklando Luksemburgo. Luksemburga Esperanto-Asocio preparas la tradukon, kaj Triksini esperas, ke ĝi jam estos montrebla en Varna. Poste ĉiuj Esperanto-kluboj povos pruntepreni ĝin de la ministerio.

La Esperanto-Centro Luksemburgo intencas eldoni sonbendkasedon (1 horo) de Ĉe-metoda leciono kun s-ino Haudebine en Ateno. La forpasinta franca esperantistino vivu plu inter ni per ŝia voĉo kaj humorplena instrumetodo. Kiu interesiĝas pri la kasedo, skribu al Esperanto Centro Luksemburgo, poŝtfako 628. Ne estas mendilo! Oni informos vin poste pri la prezo ktp.! - Pliaj informoj el Luksemburgo aperos en n-ro 13 de PP !

## Jarkunveno de la fervojistoj de Frankfurt

Kassel (pp) - Grandan nombron da membroj kaj amikoj povis saluti la distrikta komisiito de la fervojistoj-esperantistoj de la distrikto Frankfurt/M, Egon Kiefer, la 11-an de marto 1978 en Kassel. Ĉeestis la kunvenon ankaŭ reprezentantoj de la lokaj estraroj de la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo kaj Sindikatoj.

Post la prezentita jara raporto vigle diskutis la ĉeestantoj. Rekonajn vortojn pri la laboro kaj celo de Esperanto diris la ĉeestantaj reprezentantoj de Sociala Organizo kaj Sindikatoj; ili promesis subteni la informan laboron de la fervojistaj esperantistoj.

Sekvis dia-prelego pri la Eŭropa Feriosemajno pasintjara en Wengen kaj la Ski-Semajno en Grainau de la 11-a ĝis la 18-a de februaro. Oni ankaŭ eksciis, ke dank' al donacoj kaj specialaj agadoj de amikoj la distrikto Frankfurt povis sendi al la infan-vailaĝo "Bona Espero" en Brazilo 13 paketojn.

La 21-an de marto finiĝos la Esperanto-kurso por komencantoj, kiu komenciĝis aŭtune 1977.

## D-ro J. Kondor en "Nihil Novi"

Lahnstein (pp) - En n-ro 1/78 de la gazeto por lernantoj de Johannesgymnasium Lahnstein aperis vere interesa 4-paĝa intervjuo kun la instruisto d-ro J. Kondor - en germana lingvo komprenebla. La intervjuo tuŝas personajn kaj lernejajn problemojn, sed ankaŭ Esperantajn. Multaj homoj legu ĉi tiujn eldirojn de esperantisto hungardevena, nun germana civitano. Oni mendu ĉe: NIHIL NOVI, Postfach 1174, D-5420 Lahnstein, PĉK. Köln 94751-500. Prezo -,50 GM + afranko!

## Pledo por mencio de frekvencoj

Kapskue mi legis kaj legas en Pilo-Press pri la aŭdeblecoj de diversaj radiostacioj.

Mi ne havas simplan aparaton, kaptas sur ĉiu milimetro de la diversaj bendoj stacion post stacio - mi eĉ kaptis Tokion -, sed ekz. ne ORF, Romo, Stockholm, Sofio kaj Pekino. Jam depost duona jaro mi provas kaj provas, sed vane. Mi ne nur serĉas kaj serĉis sur unu bendo, sed sur ĉiuj 11 bendoj de mia aparato, kun plej diversaj antenoj.

Jen mia peto: certe estos eble al vi en viaj raportoj pri "Esperanto en Radio" mencii ankaŭ bendon kaj frekvencon de la koncerna stacio, por ke oni ne devas turni la butonon tien kaj reen trans la tutaj bendoj. Kiam oni povus koncentri sin je mallonga parto de la koncerna bendo, la afero certe estus pli facila kaj eble sukcesa. Aliakaze la sendotempo tro rapide forpasas kaj pro tio la serĉado tro malpreciza.

W. Stockhausen, Rodenbacherstr. 17, D-8770 Lohr

Noto de Pilo-Press: Pilo-Press estonte klopodos citi la bendon kaj la frekvencon de la aŭskultitaj elsendoj. Samtempe ni petas la radiostaciojn publikigi en siaj bultenoj kaj la bendojn kaj la frekvencojn.

## La semajna komentario el Aŭstrio

La semajna komentario de d-ro Alfred Macher, ORF-Vieno, legitaj de d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal, de la 11-a kaj 12-a de marto 1978, tekstas:

"En ĉi tiuj tagoj multaj aŭstrianoj rememoras tion, kio okazis al nia lando antaŭ 40 jaroj, nome ĝia anekso al Germanio fare de ties Hitler-reĝimo. Kanceliero Kreysky komisiis laborgrupon de k a j historiistoj k a j persone tiam partoprenintoj, ke ili esploru la parte ankoraŭ nekonatajn - en nia longa interna interbatalado radikantajn - kaŭzojn kaj antaŭkondiĉojn de tiu kruela anekso.

La faktoj, kiujn la komisiono jam malkovris kaj ankoraŭ malkovros, ne reveku malnovajn disputojn, ili ne re-disŝiru vundojn intertempe jam fermiĝintajn, ili nur faru nin pli prudentaj, ili averte instruu nian junan generacion pri la fatala historio de la tridekaj jaroj, alie por ili apenaŭ plu imageblaj.

La junaj aŭstrianoj konvinkiĝu profundkore, ke nenio estas por popolo pli pereiga ol esenca malakordo, ol senkonsidera subpremo de la aliulaj libero kaj opini-esprimo.

Nu, en la lastpasintaj jaroj la aŭstrianoj multfoje pruvis, ke ne nur interne de siaj landlimoj ili pensas demokrate, sed, riĉaj je sperto el sia pasinteco, ili ankaŭ pledas por tolero inter ĉiuj nacioj sur nia terglobo."

(Aŭskultita sabate, je la 11.3.78, 17,45 horo, sur ondo 48,74, 6155 khc. Sufiĉe bona aŭskultebleco!)

## Semajno de Internacia Amikeco

Triesto (pp) - Por inde festi la datrevenon de la Semajno de la Internacia Amikeco, la Triesta Esperanto-Asocio aranĝis publikan artan vesperon, la 26-an de februaro. Vigla stabo da rolantoj prezentis klasikajn muzikpecojn, spritajn skeĉojn kaj emblemajn poeziaĵojn el diversaj landoj de la tuta mondo. La programo daŭris unu kaj duonan horon kaj ĝin ĉeestis ankaŭ multaj ne-esperantistoj. - Lokaj radioj kaj ĵurnaloj sendis siajn reprezentantojn kiuj proponis al T.E.A. kunlaboradon kun la koncernaj redakcioj.

Pier Giorgio Soranzo

**********************

Aŭskultu radio-elsendojn! Skribu al la redakcioj!
Legu gazetojn kaj librojn - abonu kaj aĉetu ilin!

## Reagoj, opinioj

### Politikaj artikoloj en Mundo

La bulteno "Mundo", n-ro 118 de la 1978-03-05 (Eldonanto: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, S-421 74 Västra-Frölunda, Svedio) publikigas i.a. jenan artikolon:

"Pli kaj pli klare mi opinias, ke ni esperantistoj devos orientigi nin al la vivo ĉirkaŭ ni. La elsendoj de la radiostacioj de Varsovio kaj Vieno ŝajne ankaŭ volas uzi esperanton por tio. Ili ofte donas informojn kun pli-malpli politika aspekto. Kaj ja estas tute nature, ke se ni deziras ke nia lingvo ludu internacian rolon, ĝi devas funkcii ankaŭ en politikaj rondoj. Komenco jam estas de longe farita en socialisme koloritaj movadoj. SAT eble principe estas nepartia, sed reale ĝi verŝajne inklinas al socialismo. La socialista partio de Italio faris proponon, uzi esperanton en praktika intertrakta laboro, kaj oni nur devas bedaŭri, ke la aliaj socialismaj partioj ne estis sufiĉe saĝaj por subteni tiun proponon.

Red. de Mundo kredeble en politikaj aferoj opinias, ke la miks-socio estas tiu, kiu plej bone funkcias, sed mi tendencas al liberala flanko. El redakta vidpunkto novaĵo estas novaĵo kaj tial plej ofte publikigenda. La redaktoro ne necese aprezu, kion oni publikigas.

Sed por reiri al politikaj aferoj. Mi trovis en Pilo-Press artikolojn, kiujn mi opinias publikigendaj kaj tial redonas ilin ĉi tie. Mi esperas, ke s-ro Pickel nenion havas kontraŭ tio. Pilo-Press ja kelkrilate funkcias kiel esperanta novaĵburoo. — Oso. "

### Noto de Pilo-Press

Kompreneble, ĉiu redaktoro rajtas reprodukti informojn kaj artikolojn el Pilo-Press. Pilo-Press ja ĉefe estas informservo.

### Efiko de Pilo-Press

Mi dankas elkore por via bonkoreco. Mi ricevis multajn afablajn leterojn de diversaj landoj. Se mi ne havus vian helpon, mi ne povus havi ĉi tiel multajn amikojn en Eŭropo. Mi sendas mian saluton al vi kun mia grandega danko. Nun mi opinias, ke Esperanto estas tre granda movado.

Via juna amikino

78-03-10

Masami Hongo, 5-33 Jaisho-cho
Nakamuara-ku Nagoja-city
Aichi 453 Japanio

### Pri Portugala Nacia Radio

Dividu kun s-ano Josef Kondor mian sinceran dankon por la informo pri Portugala Radio en PILO-PRESS n-ro 10, ĉar mi nur pro tio sukcese povis kapti la Portugalan Nacian Radion, je la 1978-03-12-a sur ondo ĉ. 30 m = ĉ. 9750 mhc, je la 21,50 h kaj 22,20 h - sufiĉe bone aŭdebla.

Pri viaj aŭdeblaj raportoj en PILO-PRESS mi nur povas skribi, ke ili estas ĉiam preskaŭ samaj kiel en Vieno.

Dankon mi volas ankaŭ esprimi por via tre grava Informservo-laboro.

Sincerajn salutojn via fervora leganto

Leopold Patek
Spittelauerlände 19-21/B/5/18
A-1090 Wien 9, Aŭstrio

********************

Subtenu la laboron de PILO-PRESS - Legu kaj abonu PILO-PRESS

Jara abonkotizo 30,-- DM, pagebla al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉeka konto Nürnberg 819 56- 851.

Esperantistoj en Leipzig

Leipzig/Bad Hersfeld (pp) - Semajnfine, la 11-an kaj 12-an de marto, en Leipzig okaze de la Printempa Foiro kolektiĝis 120 esperantistoj el 6 landoj por la jam tradicia renkontiĝo. Laŭ informo de "Hersfelder Zeitung" de la 15.3.78, laŭ invito de la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR partoprenis en la renkontiĝo Richard Hirsch, sekretario de GEA, kaj s-ino E. Hirsch, ĉefdelegitino de UEA, kiel reprezentantino de UEA.

El la programo elstaras prelego pri la temo "La pola kulturo - parto de la mondkulturo" kaj la prezentado de la komedio en Esperanto "La hiptnoto" de A. Cwojdzinski, prezentita de la Pola Esperanto Teatro.

Kun la aktoroj el Varsovio s-ro Hirsch priparolis detalojn de la en aprilo kaj majo okazonta turneo de la Pola Esperanto Teatro tra 13 urboj de Federacia Respubliko Germanujo.

********************

Esperanto en la Radio

Zagrebo. Depost 25 jaroj Radio Zagreb nun elsendas en Esperanto. Tiun fakton la esperantistoj rekonu kaj skribu al la stacio dankleterojn. Jen la adreso: Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb.
Sur ondo 265 m (mezondo) = 1163 kHc ni bone, kiel ĉiam, aŭskultis la interesajn novaĵojn el Jugoslavio kaj la radian artikolon pri "Kroata angulo en Aŭstrio". Certe, ni kelkfoje aŭdis pri minoritato en Aŭstrio de slovenoj, pri kiuj ORF jam kelkfoje raportis. Estus interese foje aŭdi la aŭstran starpunkton pri la kroatoj en Aŭstrio fare de ORF, Esperanto-Redakcio.

Vieno. La ĉi-semajna komentario de d-ro Alfred Macher, legita de d-ro Karl Beckmann kaj s-ro Bronec, traktis brulantajn problemojn: la forkondukon de Aldo Moro en Italujo kaj la masakron en Israelo kaj Libano el aŭstra vidpunkto, laŭ kiu ekestis malakordo inter Vieno kaj Jeruzalemo. Pacan solvon nur povas garantii, laŭ la komentario, hejmlando de la palestinanoj. Demando de Pilo-Press: Kie estu tiu hejmlando? Laŭ ni ankaŭ la judoj havas la rajton je sia hejmlando en Palestino! - Sekvis la dua parto de la enkondukaj vortoj de d-ro Hartl pri lia broŝuro 4. La elsendo en Nürnberg bone aŭskulteblis en ambaŭ elsendoj, do la 18-an kaj la 19-an de marto, je la 17,45 h resp. 6,45 h, sur ondo 48,74 m = 6155 kHc. Adreso: ORF, Esperanto-Elsendo, A-1136 Wien.

Radio Pekino estas momente en Nürnberg tre bone aŭdebla vendrede kaj sabate sur ondo 31,98 m (9380 kHc), je la 21,oo h (MET). Ĉi-foje oni denove raportis pri aktualaj temoj. Ekz. sabate pri parolado de la vicprezidento kaj gazetaj artikoloj al la scienca konferenco en Pekino.

Varsovio. Ŝajnas, ke Varsovio kondamnas la agojn de la "Ruĝaj Brigadoj" en Italio, kies anoj verŝajne forkondukis la kristan-demokratan politikiston Aldo Moro. El la informoj kaj komentoj same aŭskultanto povas konstati la kondamnon de Israelo kiel agresoron kontraŭ Libano post la dimanĉa masakro fare de palestinaj teroristoj sur la mara strato en Israelo. Ne estas dubo - laŭ la elsendoj -, ke la pola registaro kaj la oficiala publika opinio simpatias kun la araboj kaj palestinanoj. El la informoj de la 17.3.78 ni ankaŭ eksciis, ke Moskvo pozitive taksas la rezultojn de Beogrado. (En okcidento ni ja aŭdas aliajn, ofte kontraŭajn voĉojn!). - Dum leterkesto venis bedaŭrinda informo: La Esperanto-anguletoj kadre de la germanlingvaj elsendoj ne plu estos elsendataj estonte. Ili plenumis sian celon - oni diris en Varsovio, tamen estas la opinio de Pilo-Press, ke tiu ĉesigo estas ia malvenko de la germanaj esperantistoj, kiuj tro multe neglektis tiujn anguletojn. Des pli multe necesas nun subteni la ĝeneralan Esperanto-programon el Varsovio, por ne endanĝerigi la oftecon de la elsendoj. Ĝojiga informo estas, ke dum februaro venis el F R Germanio plej multaj alskriboj (98), la duan lokon tenas kun 84 korespondaĵoj GDR.